
# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-04 n-ro 345


# La atmosfero de Venuso kaj distancaj planedoj: Loïc Rossi



Balfour-deklaro: cent jarojn poste, la Palestinanoj postulas kompenson

Gena analizo ebligis malkovrojn pri la plej rezista estaĵo tutmonde

Memhelpaj filozofiaj skoloj en la antikveco

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Balfour-deklaro: cent jarojn poste, la Palestinanoj postulas kompenson
*Tiu deklaracio aŭguris la kreon de la Israela Ŝtato p. 03*

La atmosfero de Venuso kaj distancaj planedoj: Loïc Rossi
*La Franca planedosciencisto Loïc Rossi rakontas pri sia laboro en interesa intervjuo p. 04*

Memhelpaj filozofiaj skoloj en la antikveco
*Stoikismo p. 07*

Gena analizo ebligis malkovrojn pri la plej rezista estaĵo tutmonde
*Tardigradoj estas mikroskope etaj, segmentitaj bestetoj p. 09*

Hodiaŭe
*Aŭstrio p. 09*

# Balfour-deklaro: cent jarojn poste, la Palestinanoj postulas kompenson

Ĉi 2an de novembro, ni festas la centjariĝon de historia dokumento, kiu ŝanĝis la situacion de Mez-Oriento, la Balfour-deklaro. Antaŭ jarcento precize, la 2an de novembro 1917, la brita ministro pri fremdaj aferoj Lord BALFOUR engaĝiĝis en subteno al kreado de nacia juda hejmo en Palestino. Tiu deklaracio aŭguris la kreon de la Israela Ŝtato en 1948, sed ankaŭ la israel-palestinan konflikton. La centjariĝo de tiu teksto, fundamenta por la Israelanoj, estos memorfestata en Londono. Theresa MAY akceptos por la okazo sian samrangulon Benjamin NETANJAHU, Israelan Ĉefministron. Tio ĉi estas spertata de la Palestinanoj kiel insulto. Ili petas hodiaŭ kompenson de Unuiĝinta Reĝlando.



Por priskribi la Balfour-deklaron, kiu engaĝiĝis subteni, antaŭ 100 jaroj, la kreon de nacia juda hejmo en Palestino, Mustafa BARGHUTI, membro de la centra komitato de la Organizaĵo por Liberigo de Palestino rekte asertas: «Balfour-deklaro estas krimo, kiu starigis la bazojn de etna purigado de la Palestina popolo en 1948».

Tiu teksto estas laŭ li je la origino de la *Nakba*, "katastrofo" en la araba lingvo. La Palestinanoj nomas tiel la militon, kiu sekvis la kreon de Israelo en 1948, kaj kiu instigis 700 000 el ili forlasi siajn hejmojn. Laŭ Nabil ŜATTH, konsilisto de la palestina prezidento Maĥmud ABBAS, la tempo pri ekskuzoj alvenis. «Jen la momento memorigi al la mondo kaj al Unuiĝinta Reĝlando, la konsekvencojn de tiu Balfour-deklaro, petante de ili samtempe, ke ili pardonpetu pri la doloro kaj detruado, kiujn ili okazigis. Jen la momento peti kompensojn. Unu el tiuj kompensoj estus agnoski la Palestinan Ŝtaton laŭ 22% el la historia teritorio, t.e Cisjordanio, Gazao kaj Orienta Jerusalemo».

La Palestinanoj anoncis, ke ili studas la manierojn procesi kontraŭ Unuiĝinta Reĝlando.

Neniam Milito Inter Ni

# La atmosfero de Venuso kaj distancaj planedoj: Loïc ROSSI

La Franca planedosciencisto Loïc ROSSI rakontas pri sia laboro en interesa intervjuo.



Antaŭ iom da tempo, Loïc ROSSI instigis novan flamon en la Esperantlingva scienca mondo per sia Jutubkanalo. La planedosciencisto planas krei filmojn pri diversaj temoj ene de sia fako. Dum la hanovena Esperanto-renkontiĝo KKPS en Nederlando mi havis la ŝancon paroli kun li pri scienco, kio rezultis je la jena intervjuo.

***Kiel via academia kariero aspektis ĝis nun?***

*“La plejmulton de mia studo mi faris en Francio. Mi akiris mian mezlernejan diplomon kun scienca fakaro kaj sekvis du jarojn da preparigajn klasojn. Tio estas parto de la Franca sistemo kie oni tre intence studas dum du jaroj por poste povi esti akceptata en altstatusa inĝeniera lernejo aŭ ”granda lernejo”. Mia celo estis akceptiĝi en unu el la plej famaj institucioj por fiziko, nome la École normale supérieure. Malgraŭ miaj penoj mi bedaŭrinde ne havis adekvatan nivelon. Anstataŭe mi decidis enskribiĝi ĉe universitato por eniri la trian jaron de fundamenta fiziko. La sekva paŝo estis akiri magistran diplomon. Tiun mi akiris en la fako astronomio kaj astrofiziko en la observejo de Parizo. Dum la sekvaj tri jaroj mi komencis tezon pri la nuboj de Venuso, bazite de la mezuroj de la sondilo ”Venus Express” de la Eŭropa Spaca Agentejo. En tiu periodo mi ekkunlaboris kun mia nuna ĉefino en Delft, kiu poste trovis la monon por dungi min.”*


***Kion vi esploras nuntempe?***

*“Mi ankoraŭ iomete okupiĝas pri Venuso, pro tio ke mi laboras kun studentoj kaj kolegoj kiuj esploras tiun planedon. Mia fokuso tamen estas la atmosferoj de ekstersunsistemaj planedoj. Mi kreas ciferajn modelojn por la atmosferoj de tersimilaj planedoj. Per tiuj modeloj oni povas simuli la strukturon kaj kunmeton de la atmosferoj de tiuj planedoj. Specife mi interesiĝas pri kiel nuboj polarigas la lumon kiu estas reflektata de la atmosfero. La lumo reflektata per la planedo estas multe pli malhela ol tiu de la stelo. Oni povas kelkfoje distingi la planedon kaj sian stelon per bonega teleskopo, sed tio estas tre malfacila.Pli bonas rigardi la polarigadon de la lumo, ĉar la stelo mem kutime elsendas nepolarigitan lumon. Se oni do vidas periodajn ŝanĝiĝojn de la polarigadon de la lumo, oni povas konkludi ke tiu polarigado estas kaŭzata de planedo.*

*Kiel ekzakte la polarigado ŝanĝiĝas laŭ tempo, indikas precize kiaj gasoj aŭ nuboj troviĝas.”*

***Kial tiu temo logas vin?***

*“Mi ne ekzakte memoras kiam mi ekinteresiĝis pri astronomio, sed mi ja memoras la unuajn librojn kiujn mi havis pri astronomio. Unu donis tre bonajn informojn pri diversaj planedoj kaj vere logis min. Ĉio pri la diferencoj inter la planedoj kaj iliaj historioj vere revigis min. Unu jaron mia onklo donacis al mi teleskopon, per kiu mi mem povis fari bazajn observojn. Kompreneble la plej facilaj celoj en la ĉielo estas la planedoj kaj la luno (en planedoscienco oni ne nur studas planedojn, sed ankaŭ objektoj kiuj similas al tio, kiel lunoj kaj asteroidoj). Vidi Jupiteron aŭ la ringojn de Saturno per miaj propaj okuloj estis neforgesebla. Miaj gepatroj povas konfirmi ke jam de mia juneco mi paroladis pri astronomio kaj kiel mi volis studi tion. Mi do estas unu el la malmultaj homoj kiuj povas studi kaj labori pri tio kion ili jam prirevis kiel infano.”*



***Kiuj nesolvitaj demandoj estas aktualaj en via fako?***

*“Pri Venuso ni havas multajn demandojn pri la dinamikoj de la atmosfero. Temas pri moviĝoj, kiel tiuj de vento. La atmosfero ĉirkaŭiras multe pli rapide ol la planedo mem, kun ventoj de cent metroj sekunde. Ni ankoraŭ ne komprenas kiel tiaj dinamikoj ekaperas. Ankaŭ la klimato de Venuso estas grava temo. Venuso kaj la Tero formiĝis pli-malpli samtempe kaj komence tre similis. Malgraŭ tio, ili tute malsame evoluis. Scii pli pri kiel Venuso ŝanĝiĝis povas instrui al ni pri la historio de nia propra klimato kaj averti nin pri ebla estonteco.*

*Pri ekstersunsistemaj planedoj la ĉefa celo estas trovi planedon similan al la Tero. Por trovi tion, oni unue solvu multajn pli etajn problemojn. Unu el ili estas ke ni pensis antaŭe ke nia sunsistemo estas tre kutima, sed tio ŝanĝiĝis kiam ni trovis multajn sunsistemojn kiuj funkcias tute malsame, ekzemple kun gigantaj planedoj tre proksimaj al la stelo.”*

***Kiel vi praktikas sciencon ene de Esperantujo?***

*“Mi havas Jutuban kanalon pri scienco kaj specife astronomio kaj planedoscienco. Krom tio mi estas ano de ISAE, kie mi estas la respondeculo pri la astronomia sekcio. Mi ankoraŭ pripensas kiel funkciigi tion. Mi ankaŭ ŝatus verki artikolojn por la revuo de ISAE. Mi*

*nuntempe verkas artikolon kaj pripensas traduki almenaŭ la unuajn du ĉapitrojn de mia tezo."*

***Kio instigis vin al krei Esperantlingvan Jutubkanalon?***

*"Mi volis antaŭenigi sciencon en Esperantujo kaj pli ĝenerale en la lingvo Esperanto. Laŭ mia opinio, Esperanto estas tre taŭga lingvo por scienco. Jam dum longan tempon mi volis fari ion pri scienckomunikado per Jutubo aŭ blogo, sed en la Franca kaj Angla jam estas multaj homoj kiuj faras tion. Restus la ebleco distingi min per propra stilo, sed la fako jam estas sata. Feliĉe la celoj de helpi Esperanton kaj scienckomunikado harmonie kunfandiĝis kaj nun mi estas unu el la unuaj en la kampo."*

***Kiel, laŭ vi, Esperanto kaj teĥnikaj sciencoj povas helpi unu la alian?***

*"Esperanto povas helpi sciencon, ĉar kiam mi iras al sciencaj kongresoj, la oficiala lingvo estas la angla. Same kiel en aliaj fakoj, denaskaj angleparolantoj havas avantaĝon. Tio specife videblas kiam oni komparas ilin al ekzemple sciencistoj el Azio, kiuj devas multe peni por povi paroli la anglan. Ankaŭ la kunmetado de vortoj estas tre utila en scienco, ĉar ĝi ebligas enkonduki novajn terminojn kiujn oni ne konis, aŭ kiuj ne jam ekzistas.*

*Fari sciencon kaj verki artikolojn en Esperanto povas montri ke Esperanto estas vera lingvo, kiun oni povas uzi por seriozajn aferojn. Fari sciencon en Esperanto kreas novajn vortojn, librojn, artikolojn, filmetojn ktp. Tio ankaŭ estas varbilo por montri ke la lingvo povas esti uzata por ĉia celo. Tion eĉ sufiĉe da naturaj lingvoj ne povas atingi, ĉar institutoj ne havas intereson aŭ kapablon fari tion."*

***Ĉu vi havas konsilojn aŭ avertojn por junuloj kiuj pripensas teĥnikan karieron?***

*"Seniluziiĝu pri la karieroj en sciencaj fakoj. Ĉefe pri serĉado en universitatoj. En firmaoj en la privata sektoro eblas, specife se oni estas inĝeniero. Tamen se oni interesiĝas en tre fundamenta temo kiel fiziko aŭ matematiko, oni devas scii ke ekzistas malmultaj eblecoj. Ne ĉiuj novaj doktoroj povas iĝi profesoroj, ĉar ne estas la bezono. La plejparto do iru en entreprenojn.*

*Se vi ankoraŭ volas ĉasi tian karieron, certe provu. Ne timu, sed sciu ke trovi laboron en universitato povas esti malfacila. Se oni ankaŭ pretas por eniri firmaon, oni ne havos problemon."*


Mi elkore dankas Loïc Rossi pro ties kunlaboro dum tiu ĉi intervjuo. Lerni pri lia fako kaj liaj opinioj rilate al scienco kaj Esperanto estis tre interesa kaj scivoliga. Mi esperas vidi ankoraŭ multe da filmetoj estontece kaj esperas ke mi baldaŭ revidos lin. Por vidi pli de Loïc Rossi, certe vizitu lian Jutuban kanalon (vidu) aŭ profesian retpaĝon (vidu).

Frank van Hertrooij
scivolemo.wordpress.com

# Memhelpaj filozofiaj skoloj en la antikveco

## I – Stoikismo

Ĉirkaŭ la 3-a jarcento a.K., post la klasika periodo de la filozofio en Grekio, kiam elstariĝis SOKRATO, PLATONO kaj ARISTOTELO, ekaperis tri filozofiaj skoloj — stoikismo, epikurismo kaj skeptikismo —, kiuj daŭris pli ol kvin jarcentojn kaj karakterizis la tiel nomatan Helenistikan epokon de la filozofio. En tiu nova monda ordo, estigita de la militaj konkeroj de ALEKSANDRO, la Granda, okazis la dekadenco de la greka kulturo.



Sub la regado de ALEKSANDRO kaj poste de Romo, la grekoj suferis multe pro la fremda okupado kaj perdo de sia politika graveco. Ili senkuraĝiĝis. Artoj, sciencoj kaj kolektivaj aktivecoj estis forlasitaj, socia kunvivado cedis al soleco, al zorgado pri si mem. En tiu kadro, stoikismo, epikurismo kaj skeptikismo helpis ilin elporti la bedaŭron pro la ruiniĝo de sia civilizacio.

Tiam la filozofio iĝis por tiu popolo rimedo por alfronti la doloron kaj la destinon kaj ankaŭ por ekzameni la vivon kaj serĉi la individuan feliĉon. La tri cititaj skoloj lasis en la historion siajn proprajn signifojn, ankoraŭ nuntempe rigardataj kiel tri malsamaj tamen konsiderindaj manieroj pensi kaj vivi por esti feliĉa aŭ almenaŭ ne suferi:

**Stoikismo** = kapablo elteni kuraĝe kaj saĝe la suferojn kaj ĉagrenojn de la vivo. Stoikulo estas forta, neŝancelebla kaj rezignacia.

**Epikurismo** = serĉado de plezuro kaj evitado de doloro. Ĉar plezuro estas malo de doloro, se oni trovas la kaŭzojn de suferoj, sekve oni povas eviti ilin kaj vivi plezure.

**Skeptikismo** = Dubo, nefido, nekredado. La absoluta vero ne ekzistas, aŭ, se ĝi ekzistas, ne eblas koni ĝin. Eblas trovi sufiĉe da paco kaj feliĉo en tio, kion oni kaptas per niaj sensoj.

Stoikismo estas fondita de ZENONO el Kitiono (ĉ. 333 – 264 a.K). Estinte riĉulo, li perdis ĉion kaj decidis vivi modeste, pensante pri la sortobatoj kaj aliaj malfeliĉaĵoj de la destino. Neniu el liaj skribaĵoj postrestis. Du aliaj famaj stoikistoj estis la roma imperiestro Marko-AŬRELIO (121 – 180) kaj la sklavo EPIKTETO (50 – ĉ.125).

Laŭ la filozofoj de stoikisma skolo, ekzistas senfina kaj ĉiopova dio, kiu regas la naturon kaj la homajn vivojn. Ĉio havas kaŭzon, nenio okazas hazarde. La homoj ne povas regi la kaŭzojn kaj do ne povas eskapi el sia destino.

La destino de ĉiu homo estas plenumi difinitan rolon en la mondo. Ĉiuj ni povas, per nia racio, koni tiun rolon, eltrovi niajn naturajn inklinojn kaj sekve vivi konforme al nia propra

naturo.

EPIKTETO skribis: *“Memoru, ke vi estas aktoro de teatra spektaklo, longa aŭ mallonga, en kiu ties aŭtoro volis vian partoprenon. Se via rolo estas de almozulo, princo aŭ vendisto, estas necese, ke vi ludu kiel eble plej bone tiun rolon, surscenîĝante aŭ elsceniĝante kiam la aŭtoro decidos tion. Via tasko estas ludi bone vian rolon.”*



*Vivi saĝe estas bone koni siajn talentojn kaj emojn kaj plenumi sian destinon. La saĝa homo estas forta, ĉar li ne bedaŭras siajn suferojn kaj malfacilaĵojn kaj ne fieras pro siaj sukcesoj. Li estas libera se li regas siajn pasiojn kaj lin perturbas nek doloroj, nek gloroj. Li ne deziras pli ol li povas havi, kaj kulpigas neniun pri la malbonaj okazajoj de sia vivo.*

*Esti libera estas ne deziri pli ol ni povas havi, kaj ne esperi de la aliaj pli ol ili povas doni al ni. Esti libera estas rigardi same gajnon kaj malgajnon. Eblas esti libera en prizono, tamen eblas esti sklavo en ŝajna libereco, se oni timas aŭ plendas pro ĉagrenoj.*

*Por esti feliĉa kaj libera la homo devas gvidi siajn dezirojn kaj ne atendi de la vivo pli ol ĝi povas doni al li. La ĝojoj estas mallongdaŭraj kaj la doloroj estas bezonataj. La malbono neniam malaperos, ĉar ĝi estas necesa por reliefigi la bonon.*

*Estas necese distingi la aferojn dependantajn de ni de tiuj, kiuj ne dependas de ni. Ĉi tiujn la destino trudas en nian vivon. Tiusence Epikteto skribis: “Ne petu, ke la aferoj okazu laŭ viaj deziroj, sed deziru, ke ili okazu kiel ili devas okazi. Ni estas liberaj kiam ni liberiĝas de ĉio, kio ne dependas de ni.”*

La stoikuloj sin taksis fortaj pro tio, ke ili ne timis la morton (ili kredis pri transtomba vivo) kaj ne sin kroĉis al la vivo. Verŝajne la unuaj kristanoj inspiriĝis el ili por elteni rezignacie la suferojn kaj ankaŭ por fidi la providencon.

Pri la tempo, estas kurioza malkonsento inter la stoikistoj. Laŭ unuj, la estanteco ne ekzistas, dum laŭ aliaj la tempo estas eterna estanteco, ĉar la pasinteco ne plu ekzistas kaj la estonteco ankoraŭ ne ekzistas.

Ankoraŭ rilate al la tempo, estas esenca en stoikismo la koncepto pri efemereco de la surtera vivo. La imperiestro Marko-AŬRELIO skribis: “Vi estas tre malgranda ero en la universo, en kies senfina daŭro vi ricevis ĉi tiun rapidan momenton por vivi.”

José Mauro PROGIANTE
La Lampiro, n-ro 147

# Gena analizo ebligis malkovrojn pri la plej rezista estaĵo tutmonde

Tardigradoj estas mikroskope etaj, segmentitaj bestetoj, ankaŭ konataj kiel "ursoj el akvo". Ili kapablas postvivi al radiado, frostiĝo, severa dehidratiĝo, kaj eĉ spaca vakuo.



Laŭ studo publikigita en la sciencorevuo "*PLOS Biology*", esploristoj malkodis DNA-on (desoksiribonukleata acido) de du specoj de tardigradoj, kaj ili malkovris la respondecajn genojn pri la post elsekiĝa regenerado de tiuj estaĵoj.


La tardigradoj estas nur 1-milimetron longaj, aŭ malpli, kaj ili estas konsiderataj la plej rezistaj estaĵoj de la mondo, kun ŝanco postvivi je preskaŭ ĉiuj kosmaj katastrofoj kiuj trafus la Teron, laŭ esploro farita antaŭnelonge.

Tiuj bestetoj oni trovas ĉe sekiĝeblaj lokoj, kiel marĉoj kaj lagoj. Ili akiris la kapablon rezisti al akra dehidratiĝo, kaj jarojn post reveni al la aktiva vivo, se ili denove kontaktos akvon.

Dum sekiĝo, kelkaj genoj de la tardigradoj produktas proteinojn, kiuj anstataŭas mankantan akvon ĉe la ĉeloj. Kiam denove akvon disponeblas, tiam la ĉeloj estos provizataj, dissolvante la proteinojn.

Laŭ la sciencistoj, kompreni tian denaskan kapablon pri postvivado povos utili al la homaro, ekzemple je tutmonda disdonado de "vivantaj" vakcinoj sen bezono de malvarmigado.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog



## Bildo de la tago

**La montaro *Karawanks*,**

**Aŭstrio.**

**Vikipedio**